Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI – 13-a de Januaro 2020

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Jehoŝua Tilleman, Gabi Zeevi. **Gastoj**: Michal Amir, Joela Egozi, Lea Kudevitzky, Eldad Salzman.
Protokolo *de la pasinta kunsido en la retejo:*
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201912.pdf

1. Raportoj (Amri)

a) Amri partoprenis en la novjara kunveno ***Luminesk*** en Germanio; disdonis ekz-erojn de IE kaj varbis abonanton por du jaroj (20 eŭroj).
b) Lusi Rimon partoprenis alian eventon, la ***Novjaran Renkontiĝon***.
c) Amri korespondis kun la Ĝenerala Direktoro Martin Schäffer, kiu konfirmis ke la IM-aranĝo por Israelo daŭros ankaŭ dum la jaro 2020.

2. Taskoj en la nova estraro

a) Elekto de la nova Prezidanto: la plimulto de la membroj ne povas pro diversaj kialoj. Jehoŝua akceptas la taskon, malgraŭ personaj rezervoj *(unuanima aprobo aplaŭdita)*.

b) La nova Estraro (novaj taskoj **diklitere**):
Dror Gaon – la retejo de ELI;
Asaf Ĥefec – teknikaj aranĝoj *;,
Matilda Landaŭ – kulturaj aranĝoj;
Mikaelo Lineckij – redaktoro de IE, **vicprezidanto** *(unuanime aprobita voĉdone)*;
Ŝlomo Ŝaĥar – kasisto;
Jehoŝua Tilleman – Ĉefdelegito de UEA, **prezidanto** (*aprobita voĉdone)*;
Amri Wandel – komitatano-A ĉe UEA, organizanto de la IK;
Eran Yuval-Vodevoz – financ-konsultoj, juraj aferoj, KAEM (Azia agado) ĉe UEA;
Gabi Zeevi – protokolisto.

c) La dua membro por la Kontrol-komisiono (unu estas Ŝaul Ĥasid): laŭ Ŝlomo ne decidenda nun, ĉar lia raporto eblas ĝis Junio (kaj aprobenda dum la Ĝenerala Kunveno somere). **Jehoŝua**: mi ofertu al Asaf*, kiu daŭre estas trookupita familie (kaj ankaŭ hodiaŭ ne venis), rezigni pri sia estraraneco kaj akcepti la novan taskon, kun oficiala ret-avizo pri tio al la Estraro. Vigla disputo ekestis inter la Estraro kaj la gastoj pri la agado de la Kontrol-komisiono, de la Estraro kaj de la Tel-Aviva Klubo. Ĉefe Joela forte kritikis – sen proponi solvojn, aŭ proponi sian partoprenon.

3. Kurso (Amri)

a) Amri korespondis kun Eldad kaj Amir, kiuj daŭre kontraŭas ripeti la anoncon en la rubriko ***Galeria*** de la ĵurnalo ***Haarec***.
b) **Amir** kontaktis firmaon, kiu proponas profesian kampanjon en la interreto. Li opinias, ke ni ekreklamu jam nun; eble nur konstruu la paĝon, kaj eventuale li mem poste ĝin prizorgos.

2/...

Jen lia mesaĝo:
“Por 1,500 NIS monate ni ricevos profesian Facebook-paĝon plus reklamadon. Malfacile estas taksi, ĉu tio sufiĉas por ni. Nur post kiam ni komencos, ni ekscios.
Por 2,000 NIS monate ni ricevos profesian reklam-kampanjon en Facebook, kun “lernanta” algoritmo kaj rezult-alfluo post proksimume du semajnoj. Denove – ni ne povas diveni, kiom longe daŭros plenigi kurson.
Estus domaĝe komenci per tre malgranda buĝeto, kio ev-e malsukcesus. Gravas unu fojon agi profesie kaj vidi la rezultojn. La tempo estas mallonga, kaj estas malfacile decidi. Eblas ne komenci la kurson nun, kaj lasi la Asocion resaniĝi finance, sed endas jam nun, antaŭ la septembraj festoj, komenci profesian reklamadon, kun taŭga buĝeto, kaj la kurson – post ĝi.
Propono pri reklamado: ni pagu 1,000 NIS al profesia komerca Facebook-paĝo, kaj daŭrigu plifortiĝi dumtempe. Paralele ni faru kampanjon dum monato kaj duono por 3,000 NIS”.

c) Ŝlomo petis plian oferton. Amir estu petita koncentrigi tiujn temojn.

ĉ) Amri proponas komenci la kampanjon, kiam ni intencos efektive malfermi kurson. Se ni komencos la 17-an de Februaro, eblos fini 20 lecionojn ĝis la fino de Julio.

d) **Amri**: Uri Rafaeli rekomendas sian filinon Dalia Rafaeli, kiu administras profesian oficejon pri publikaj rilatoj.
e) Propono de Amri (kaj aliaj estraranoj kaj gastoj, interalie Lea pasintmonate): la kurso komenciĝu nur en Oktobro, kaj du monatojn antaŭe ni komencu la profesian reklamadon.
Voĉdono: *unuanime akceptita*.

4. <u>IK-21 – 2-a ĝis 4-a de Aprilo</u> (Amri)

a) Dror verkis retan aliĝilon (nur por eksterlandanoj), kaj enretigis la programon por la IK kaj la PK: http://esperanto.org.il/ik.html
b) En Februaro ni devos pagi al la gastejo la duan antaŭpagon, kaj liberigi la superfluajn rezervitajn ĉambrojn.

c) Amri kompilis la liston de aliĝintoj: 16 eksterlandanoj, el ili multaj ankaŭ por la PK.
ĉ) Aliĝilo por israelanoj: Jehoŝua modifos la pretan modelon, konsultante kun Amri, Dror enretigos.

5. <u>Dratverejo</u> (Ŝlomo)

a) Antaŭ du semajnoj la luanto Dima diris al Ŝlomo, ke li pagos al Amos Ŝapira (4,000 NIS plus 400 por riparo). Hodiaŭ li donis al Amos 3,000 NIS. Li ŝuldas ĝis nun 42,000 NIS!

b) Ĉu komenci la evikciado-procezon (kaj pagi la koston de 5,700 NIS)?

c) Venis letero de la Ekzekucia Instanco, ke ili fermos la dosieron kaj nuligos la evikcion – kvankam ni petis nur haltigi ĝin provizore! Ŝlomo telefonos al ili por renovigi kaj samtempe avizos la luanton pri la evikcio.

3/...

6. *Israela Esperantisto* (Mikaelo)

a) IE-168 estis presita kaj disdonita dum la ZV. Bedaŭrinde iuj el la partoprenantoj prenis mem ekz-erojn el la kesto kaj ili ne estis notitaj. Ni evitigu ĉi tion estonte.

b) Amri kunportis kelkajn ekz-erojn al Germanio – kiel menciite en la Raportoj (a).

c) La estraranoj enkovertigas dum tiu ĉi kunsido prepare por dissendo al la membroj kaj abonantoj.

ĉ) Amri dissendos la kovertojn el la universitata poŝtfilio.

La venonta kunsido: 3-a de Februaro 2020, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi